Михаил Юрьевич Лермонтов,

Preĝo

tradukita de Boris Mirski

En vea malfacila hor',
Se premas sin anim',
Mi lasas kun humila kor'
Al sorĉa preĝo min.

Per ĝia saniganta fort'
Min fortikigas mi,
Kaj spiras en la kanta vort'
Mirinda harmoni'.

Plu dubojn ne memoras mi,
Sopiro iras for,
Kaj preĝas mi, kaj ploras mi,
Kaj ĝojas, ĝojas kor'.

Traduko de la Rusa poemo "Молитва" de Михаил Юрьевич Лермонтов *(∗1814-10-16 – †1841-07-27) en Esperanton de* Boris Mirski *(Bela Manto, †1919).*

Arg-505-992 (2010-01-15 12:33:29)

Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi poem-tradukon el la retejo `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/pregxo2.html` .